Kiam la folioj flavas

Kun kellastuu lehdet puissa

Vesa Pölkki & Anja Karkiainen



© 1999 Vesa Pölkki & Anja Karkiainen


rit.
a tempo
mf
vo - las nur sci - i pri fag' kaj ti - li', ĉu
res - ti li vo - lis so - me - ron, do nur ĝis
ti - gi sin po - vos ŝi pri la ver' nur
ig - os a - flik - ton nur la am - at', ja,
po - vos ŝi hel - pi, ke por ŝi - a kor' ĉi -
1.-4.
jam la fo - li - oj fla -
ti - uj fo - li - oj fla -
dum la fo - li - oj fla -
ki - am fo - li - oj fla -
rit.
mf
9
vas.
vas.
vas.
vas.
f
Prin -
Sed
A -
Ŝi
5.
rit.
a - me l'fo - li - oj
p
f
mf
11
a tempo
fla - vas.
a tempo
f
13
rit.
15

KIAM LA FOLIOJ FLAVAS

En ĉiu vespero promenas knabin'
laŭ vojoj en parko ombra.
Sopire soleca sentas ŝi sin
eĉ en homamas' sennombra.
Vizaĝoj kaj voĝoj kaj rid' ĉirkaŭ ŝi
al ŝi nun neniom gravas.
Ŝi volas nur scii pri fag' kaj tili',
ĉu jam la folioj flavas.

Printempe sur benko jen apud la voj'
kun sia amat' ŝi sidis
kaj tie ŝi aŭdis por sia malĝoj'
ke li pri vojaĝ' decidis.
Rezisti ne povis li al aventur'.
Ja tiuj junulojn ravas.
Forresti li volis someron, do nur
ĝis tiuj folioj flavas.

Sed poste eksciis ŝi pri onidir'
ke tie li donjuanas.
Suspekto doloras la koron per ŝir'.
Ĉu nun la atendo vanas?
Ŝi volas konfidi al lia sincer',
sed eble li tamen mavas.
Certigi sin povos ŝi pri la ver'
nur dum la folioj flavas.

Amikojn renkontas ŝi sur la ale'
sed nur per kapklin' salutas.
Babili kun ili ŝi nun ŝatas ne,
prefere ŝi sola mutas.
Ĉar ne elteneblas ilia kompat'
ŝi sin kvazaŭ fuĝe savas.
Mildigos aflikton nur la amat',
ja, kiam folioj flavas.

Ŝi fide atendos al lia reven',
kaj kiam ŝi lin revidos
sin ili salutos per ĉirkaŭpren'
kaj al tiu klaĉo ridos.
Sed eĉ se ĵurrompe restadus li for,
ŝi al sia amo sklavas.
Ne povos ŝi helpi, ke por ŝia kor'
ĉiame l' folioj flavas.